



Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, eks. prezidanto de la Kulturdomo de Francilingvaj Esperantistoj

JARABONO

Jarabono : 80 fkoj

P. BABIN

Le Haut des Bourrellières
17, rue Romain-Rolland
85100 Le Château-d'Olonne
P.C.K Nantes : 2.813.61 L


(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

1996 — 3


(JULIO-AŬGUSTO-SEPTEMBRO)

EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



la naskiĝo de la suna sistemo



... Kaj la Kvin plantoj de la promesita lando

KULTURAJ KAJEROJ

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

REDAKCIA KOMITATO:

Jeannine VINCENT
26bis, rue de Milngavie
F-49150 BAUGE

Pierre BABIN
17, rue Romain Rolland
F-85180 CHÂTEAU D'OLONNE

ENHAVO

El Gresillon	1
Esperanto tra la Mondo	2
La Suna Sistemo (F. Boyet)	3-4
Kvin plantoj (S. Boniol)	5-6
Eŭrocentrismo de Esperanto (B. Golden)	7-8
La Eŭfel Turo centjara (1)	9
Bohema Tago (fino) Newell	10-11
La liberigo de la jugisto (fino) (F. Szilagyi)	12-13
Por via distro	14
La vivo de Gresillon	15-16

EL GRESILLON

En aŭgusto 1897 naskiĝis Henri Micard. Vundite dum sia junaĝo li restis nekapabla paŝi dum longaj jaroj. Dume li preparis ekzamenojn cele al instruado, multe helpata de sia kuzino, kiu fariĝis lia edzino. La unua Mondmilito, kiun li ne partoprenis pro sia handikapo, sed kies mortigajn konsekvencojn li povis konstati ĉirkaŭ si pro la malapero de pluraj liaj amikoj samaĝaj, profunde influis al li. Li revis pri paco, egaleco inter la homoj, emancipigo de la popoloj. Li ne nur revis; ĉar li estis juna viro, kiu ne kontentiĝis per konstatoj kaj kritikoj; li estis aktiva. Li do partoprenis en agado sindikata politika, kaj trovis en Esperanto plian terenon, novan ilon por triumfi siajn idealojn. Iam la cirkonstancoj puŝis lin al kreado de tiam unika organizo. Li ne nur lanĉis la ideon sed mem gvidis la unuajn malfacilajn paŝojn de la Esperanto-Domo. Cent jarojn post la naskiĝo de Henri Micard, Gresillon memorigos al la ĉeestantoj de la someraj staĝoj la vivon de la fondinto, antaŭ 46 jaroj, de la Esperanto-Domo.

Grava evento en la movado, granda evento por la miloj da homoj, kiuj vizitis la kastelon dum tiuj 46 jaroj, kiuj lernis tie la internacian lingvon, kiuj la unuan fojon praktikis ĝin tie, kiuj la unuan fojon renkontis kaj komprenis aliajn homojn el aliaj landoj, parolantajn tute fremdajn lingvojn, praktikantajn aliajn religiojn, obeantajn aliajn tradiciojn. La pordon al tiaj eblecoj malfermis Henri Micard, kiu, en 1997, estus centjara.

Ada Fighiera-Sikorska, nur 67-jara forpasis komence de aŭgusto 1996. Ŝi multe laboris por Esperanto ĉefe pere de la revuo "Heroldo de Esperanto", kies redaktoro ŝi estis dum preskaŭ 40 jaroj. Dank' al ŝia fervoreco "Heroldo" fariĝis la plej grava fonto de informado por la esperantistaro. Al Giancarlo Fighiera ni sendas niajn plej elkorajn kondolencojn.

Internacie malpli konata ol Ada sed multŝatata de sia geamikoj, Suzanne Lentaigne, edzino de Leo Lentaigne malaperis. Ŝi konstante kunlaboris kun sia edzo, profesie (ili praktikis la instrumentodon Freinet en sia lernejo) kaj por Esperanto. Tuj post la dua Mondmilito ili organizis en sia urbeto Balaruc Esperanto-Semajnojn. Ili multe helpis novajn esperantistojn kaj la redaktoro de tiu ĉi revuo, la unuan fojon interŝanĝis vortojn en esperanto kun Suzanne Lentaigne. Pro tio ni ne nur sendas niajn elkorajn kondolencojn al Leo kaj gefiloj sed diras al Suzanne kaj Leo "Dankon!".

ESPERANTO TRA LA MONDO

UEA UNIVERSALA KONGRESO: Trimil personoj el 66 landoj ĉeestis tiun kongreson en Prago. Saluti la kongresanojn la Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, la Ĝenerala Sekretario de Unesko, la Prezidento de la Ĉeĥa Respubliko, la Ĉefepiskopo de Prago kaj D-ro Louis C. Zaleski-Zamenhof. Venonta UK en Adelajdo.

SAT-KONGRESO: En Sankt-Petersburgo kunvenis samideanoj el ĉiuj kontinentoj por la kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda. La kongresanoj ĝuis la belecon de la urbo kaj ĝia regiono, ĉeestis artajn aranĝojn kaj ankaŭ la interesajn kunvenojn kompreneblaj. La venonta Sat-kongreso okazos en Aŭsborgo (Bavario).

ĈE LA FERVOJISTOJ: La lasta internacia kongreso de la esperantistaj fervojistoj kunigis 275 partoprenantojn el 21 landoj en Nederlando. La venontaj kongresoj okazos en Košice (Slovakio, 1997), kaj Aalborg, (Danio, 1998).

La priterminara laboro vigle daŭras konforme al la terminaro de Internacia Fervojo-Unio, kaj IFEF instigas la landajn sekciojn eldoni nacilingvajn fakvortarojn.

ESTONTAJ RENKONTOJ: 9-11an de novembro, staĝo pri esperanto kaj ĥorkanto en Saint-Brieuc, Francio. Informas Esperanto-22, 6 rue J.P. Calloc'h, 22000 Saint-Brieuc.

En "La Kvinpetalo", 86410 Bouresse, Francio, la 25-29-an de oktobro, Japana Semajno kun Kimie Markarian; 29/10 de oktobro ĝis 3-a de novembro: Praktikado de la lingvo diversnivela; 10-15-an de decembro, la tradicia Zamenhofa Semajno.

Internacia Infanrenkonto en la kastelo Gresillon, 13-20an de aprilo 1997.

Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso, 16-19an de majo 1997, en Stuttgart, kun samtempa kongreso de UFE.

Kongreso de SAT-Amikaro, en Limoges Francio, 29-31an de marto 1997.

27an decembro 96 ĝis la 3-a de januaro 1997, 40a Internacia seminario de Germana Esperanto-Junularo en Freiburg i. Bregau. Informas: Marc Stessgen, Hagedornstr., 6a, DE-51069 Köln.

Samdate, Internacia Festivalo por mezaĝuloj kaj junaj familioj, Würzburg, Germanio. Informas Han, s-Dieter Platz, Pf. 1149, DE-34303 Niedenstein.

En 1998 la Universala Kongreso de UEA okazos en Montpellier, Francio, de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto.

PRI UMBERTO ECO: Post apero en pluraj eŭropaj lingvoj, la libro de la fama verkisto Umberto Eco: "La serĉado de la perfekta lingvo en la eŭropa kulturo", aperis en esperanto, en traduko de Daniele Mistretta. Oni scias, ke en tiu klera libro, la verkisto studas la multajn klopodojn, dum la jarcentoj, por trovi perfektan idiomon, kiu neniiĝas la malbenon de Babelo. En tiu studo, oni trovas kelkajn paĝojn pri la lingvo esperanto.

LERNEJA EKSPERIMENTO: Okazis dujara propedeŭtika eksperimento en kvar elementaj lernejoj de Aŭstrio, Kroatio kaj Slovenio, organizita de "Interkulturo". La eksperimento montris, ke la lernintoj de esperanto estas multe pli lertaj poste en la studado de la angla kaj germana lingvoj.

LASTE APERIS: Se vi amas la rok-muzikon vi povas aĉeti la duan kompilaĵon de "Vinikosmo" de 19 muzikpecoj, eldonita sub formo de kasedo aŭ kompaktdisko, de Eŭroka, FR-31450 Donnevill.

Alia stilo: kasedo de la ruso Mikaelo Bronŝtein; koncerta surbendigo de 13 kantoj kaj 3 poemoj kun gitara akompano.

"Historio de la universala lingvo Volapuk" (1963) de Johan Schmidt, tradukita de Philippe Combet.

Kvar libretoj tradukitaj el la sveda: "Nobela novelaro, sep noveloj de tri svedaj nobelpremiitoj", "La kiso kaj dek tri aliaj noveloj de Söderberg", "En la realo troviĝas truo, nuntempa sveda novelaro"; "La beleco de Merab" de T. Lindgren.

POR VOJAĜI AL ĈINIO: Aperis "Verda reto 1996" kiu kongras pli ol 130 kontaktemaj esperantistoj, 20 lokajn organizaĵojn, fakajn organizojn, skeman mapon.

La libron oni povas akiri kontraŭ 3 dolaroj ĉe: Wang Tianyi, Xi'an-a E. Asocio, n° 74 Xiyang lu, Xi'an, Shaanxi, CN-710054, Ĉinio

LA SUNA SISTEMO

NASKIĜO KAJ KONSISTIGO

1) Enkonduko: la formado de la materio.

Kion oni scias pri tio? Estas bone klare distingi la sciencajn konojn bazitajn sur eksperimentoj kaj observadoj kun precizaj mezuroj, de la hipotezoj, kiuj provas ligi inter si la konatajn faktojn.

11) La faktoj estas:

111) La galaksioj disiras (malkovro farita de Hubble).

112) Ekzistas radia "bruo" en la tuta universo, kiun oni povas nomi "kosma bruo" (Penzas kaj Wilson 1965 - Nobel premio 1978). Al tia radiado respondas la temperaturo 3° Kelvin (tio estas -270° Celsius).

113) Ekzistas multe da heliumo en la tuta universo (multe pli ol tiu, kiu estas produktata en la steloj kiel nia suno). Tial oni supozas, ke ĝi ekzistas ekde la komenco de la universo kune kun la baza hidrogeno (la plej simpla atomo).

114) La dimensioj de la galaksioj estas proksimume 100 000 LH (LH: luma jaro, distanco laŭirita de la lumo en unu jaro) dum la distancoj inter la galaksioj estas proksimume 10 000 000 LH (tio estas centfoje pli granda).

115) En la galaksioj la diametro de stelo estas proksimume 10 miliardoj da kilometroj, dum la distanco inter la steloj estas proksimume $n \times 10\,000$ miliardoj da kilometroj (tio estas pli ol milfoje pli granda). En la planedaj sistemoj la diametroj de la planedoj estas kelkaj miloj da kilometroj dum la distancoj inter la planedoj estas pli ol 100 000 km (denove centfoje pli granda).

Kiu ajn estas la skalo, oni konstatas, ke la universo konsistas el izolitaj objektoj disigitaj per grandegaj distancoj. En tiuj "vakuoj" oni trovas gasojn, polvojn sed tiel disigitajn, ke ekzistas absolutaj vakuoj plurkilometraj inter du molekuloj.

Surbaze de tiuj scioj oni konstruis teorion konatan sub la angla formo "big bang" (granda eksplodo). Laŭ tiu teorio oni supozas la jenon:

12) La supozoj estas:

121) La eksplodo sendis laŭ ĉiuj direktoj miksaĵon de hidrogeno kaj heliumo

122) En la fluo pro kirlado formiĝis vorticoj, kiuj fariĝis galaksioj.

123) En la galaksioj sama fenomeno kondukis al la steloj.

Kaj nun ni retrovas sciencajn faktojn:

13) La steloj fabrikas la materion per nukleaj reakcioj

131) Kunfandigo de nukleoj. Ĉiuj nun scias, ke por uzi la hidrogenan bombon, kie estas kunfandigo de nukleoj, oni bezonas altan temperaturon donitan per diserigo de peza atomo (ekzemple uranio). Se oni aplikas tiajn kondiĉojn al la fabrikado de la diversaj atomoj, el la primitiva hidrogeno oni ricevas tiun skemon

Je kelkaj milionoj da gradoj oni iras de hidrogeno al heliumo. Oni bezonas 100 milionojn da gradoj por iri de heliumo al karbono. 600 milionoj da gradoj estas necesaj por iri de karbono al magnezio, kaj tiel plu, ĝis la nukleo de fero. Tiel, laŭ la observadoj de steloj, kaj teoria studo de la nukleaj kunfandigaj reakcioj, oni konkludas ke stelo povas fabriki ĉiujn atomojn ĝis, inkluzive, la fero.

132) Aldono de neŭtronoj. Sed kiel fabriki la pli pezajn nukleojn? Tiam oni pensis pri la aldono de neŭtronoj, sed por tia enkonduko de neŭtronoj, oni bezonas ankoraŭ pli altajn temperaturojn, kiuj ne ekzistas en la plej varmaj steloj (la ruĝaj gigantaj steloj). Sed okazas, ke tiaj steloj eksplodas, kaj la fenomeno estas konata sub la nomo "novao". Tia eksplodo estigas tiom da energio, ke la plej pezaj atomoj de fero al uranio povas esti kreitaj.

Kaj la eksplodo de novao ne nur kreas diversajn nukleojn de atomoj, sed krome ĵetas tian materion laŭ ĉiuj direktoj en la universon. Tiel post eksplodo de novao en la universo estas ne nur gasa hidrogeno, sed ankaŭ diversaj polvoj, kiuj entenas la diversajn nukleojn nun konatajn. Kompreneble en tia granda miksaĵo povas ekesti nova stelo, kie estos nukleoj, kiujn eble la stelo mem ne povas fabriki. Estas precize la stato de nia nuna suno, kiu mem produktas nur heliumon.

133) Lasta rimarko.

:La studo de la aerolitoj, kies konsisto plej similas al tiu de nia suno, montris, ke tia materio entenas diversajn radioaktivajn atomojn, ekzemple "aluminio 27", kiuj nun ne plu ekzistas. Pro la mallonga daŭro de la radioaktivo de tiaj nukleoj, oni povas aserti, ke ili estis formitaj iom antaŭ nia suno. Alidirekte okazis eksplodo de novaĵoj je

malpli ol miliono da jaroj antaŭ la formado de la suno.

2) La malnovaj teorioj pri la kreado de la suna sistemo.

Ekde la 18-a jarcento, oni hipotezis, ke la Tero formiĝis sine de "nebulozo", kies centro estis la Suno. Sed laŭ kiu mekanismo? Multe pli poste, kiam oni konis la nuklean fizikon, oni malkovris, ke la galaksioj kaj la steloj formiĝas sub la influo de gravito sine de kosma gasa amaso. Sub la influo de gravito la materio amasiĝas, la temperaturo altiĝas kaj komenciĝas nukleaj reakcioj. La homa cerbo ŝatas la simplecon kaj deziras, ke la leĝoj estu en minimuma nombro; tial oni hipotezis, ke la sama leĝo aplikiĝas al la planedoj: grandaj amasoj naskis la elipsajn galaksiojn, mezaj amasoj naskis la stelojn kaj malgrandaj amasoj naskis la planedojn.

Laŭ tiu teorio, kiu valoris ĝis 1970, oni klarigis la diferencojn inter la planedoj per la distanco rilate al Suno. Oni supozis, ke estis homogena amaso en formo de disko, kies centro estis pli varma kaj atingis temperaturon, kiu ebligas la nukleajn reakciojn. Tiel tiu centro fariĝis la stelo: Suno, dum la cetero de la disko pillarĝiĝis malvarmiĝante. Tiu malvarmiĝo ebligis la transiron de gasaj al solidaj formoj por la samaj substancoj. Tiel oni klarigis, ke la regionoj, kie estas la planedoj (Neptuno aŭ Plutono pli rapide malvarmiĝis ol tiu de la planedoj, kiuj pli najbaris al Suno. En 1958 H. Urey en la libro "The planets" (La planedoj) klarigis tiel la diversecon de la planedoj.

Estas interese kompari la observaĵojn kun la teorio aplikata al la "suna materio". Kiam la temperaturo malkreskas ĝis 1700°K la unuaj solidaj kondensaĵoj estas la aluminiuj kaj titanaj oksidoj. Tiuj oksidoj estas bone konataj en industrio, kie oni uzas ilin por protekti la objektojn kontraŭ la altaj temperaturoj. Kiam oni atingas 1500°K aperas la fero, kiu ne oksidiĝas pro la granda kvanto de hidrogeno. Kiam la temperaturo malaltiĝas, aperas la silikataj kombinaĵoj, kiujn oni renkontas en la malsupraj partoj de la tero, dum la aliaj elementoj restas gasoj. En ankoraŭ pli malalta temperaturo aperas la materialoj, kiuj konsistigas la supraĵon de la tero, niaj bone konataj argiloj. Kompreneble, kiam la temperaturo ankoraŭ pli malaltiĝas, ĉio solidiĝas sinsekve: amoniako, metano... heliumo kaj hidrogeno.

Ni nun komparu kun la planedoj konataj de astrofizikistoj. La plej proksima al la Suno estas Merkuro, kie oni trovas kaj la aluminiajn oksidojn kaj la feron. Tiu planedo estas tre densa kaj ne havas atmosferon.

Pli malproksime sur Venuso abundas la silikatoj, kaj oni povas supozi, ke, kiam okazis tiu solidiĝo, gasoj restis kaptitaj, kiuj poste konsistigis la nunan atmosferon, kiu estas tre varma kaj kie mankas hidrogeno kaj sekve ankoraŭ akvo.


Poste venas la Tero, kie la mineraloj, kiuj entenis akvon povis kondensiĝi pro la pli malalta temperaturo kaj poste liberigis tiun akvon, kiu konsistigis la oceanojn. Por Marso la argiloj kaj sulfuro estis pli abundaj kaj pro tio la denseco estas pli malalta kaj la atmosfero estas precipe karbona.

Pli malproksime estas granda intervalo sen vera planedo sed multaj korpoj, kiujn oni nomas asteroidoj. Trans la regiono de la asteroidoj, la temperaturo ĉiam restis malvarma; ĉiuj kemiaĵoj estas kondensitaj kaj la konsisto estas preskaŭ la sama por ĉiuj planedoj, kiujn oni renkontas. Unue Jupitero, kiu estas multe pli granda kaj kiu estas ĉirkaŭita de heliumo, amoniako, metano kaj hidrogeno. La denseco de tiu planedo estas malgranda kaj la substancoj kiuj konsistigas ĝin tre similas al tiu de la suno. La plej malproksimaj planedoj (Urano, Neptuno kaj Plutono) similas al Jupitero; tie abundas la malmulte densaj substancoj. Oni tiel konstatas, ke la diferencoj inter la planedoj de la sistemo estas kvazaŭ la konfirmo de la supre citita teorio: ju pli proksima al la suno, des pli varma estis la materio, kiam ĝi kondensiĝis.

Tiu teorio ŝajnis tiam tute kontentiga kvankam ĝi ne klarigas, kial Jupitero estas multe pli granda ol la aliaj planedoj, kaj nenio klarigas la ekziston de asteroidoj anstataŭ planedo inter Marso kaj Jupitero.

F. BOYET

(daŭrigota)



LA KVIN PLANTOJ

DE LA

PROMESITA LANDO

1- OLIVO - La olivarbo, kredeble el Sirio, estus transirinta al Egiptio kaj, 16 jarcentojn antaŭ nia erao, al Helenio, tien venigita de la fondinto de Ateno. En Francio oni opinias, ke ĝi venis 7 jarcentojn antaŭ Kristo. Sed nia nuntempa olivarbo estas la rezulto de longa prilaborado de generacio al generacio por plibonigo de la sovaĝa specio. Kelkaj opinias, ke pro aparte longa vivdaŭro, la specimenoj hodiaŭ videblaj sur la loko, kie Kristo travivis sian agonion, estus la arboj de li kontemplataj. Ŝajnas tamen, ke la vero iom malsamas: la nuntempaj arboj estus plantidoj de la dua generacio, sed ties stumpo povas esti pli ol dumiljara.

Tipe mediteranea, la olivarbo arbitraciis en Helenio la rivalecon inter Atena kaj la mardiaĵoj - tiela la legendo... Ĉiuokaze la leĝo draste punis la olivarbofuŝantojn kaj estis malpermesite uzi ĝin, kiel brulmaterialon. La helena tradicio reatingas la biblian: post la diluvo la homaro reakiris la dian favorkorecon, kiam kolombo, kun olivarba branĉeto tra la beko, sin direktis al la arkeo. Por la Hebreoj tiu arbo estis simbolo de paco kaj prospero. Cetere oni ĉiam konsideris ĝin, kiel lumo-arbon pro la oleo el la frukto eltirata, kiu nutradis la lampojn.

La koranoteksto komparas la dian lumon kun "niĉo, kie troviĝas lampo; la lampo staras en glaso; la glaso similas tre brilan astron; la lampo akiras sian lumon de benita arbo, la olivujo, kies oleo lumigas preskaŭ sen fajrokontakto." Por la islamanoj, olivujo estas la mondoakso, la simbolo de la universala homo kaj de la Profeto.

La sanktaj oleoj per kiuj la kristanoj ŝmiras kelkajn korpompartojn de la agoniantoj estas simbolo de eterna vivo. Iam

olivoleon la rabistoj strebis havigi al si pro tio, ke laŭ popola kredo ĝi konsistigas protektadon por tiu, kiu per ĝi sin ŝmiras. Dum la frua mezepoko oni konsumis malmulte da grasaĵoj (ĉefe lardon kaj porko grason oni kutimis uzi). Poste urbokreskado estigis grandproportcian viandokonsumadon kaj la pliigantaj brutaroj damaĝis la olivarbojn. La revivigo de tiu arbo datiĝas ĉe ni de la XVI-a kaj XVII-a jarcentoj, kiam oni denove ilin plantadis en Provenco kaj Langvedoko.

2- FIGO - Ni ĝin titolu "misa frukto". La etaj floroj kuŝas unu ĉe la alia funde de receptaklo. En la momento de maturiĝo ĝi fariĝas karnoriĉa: jen la figo. Kion oni taksas grajnoj subdente kraketantaj, tio fakte estas inaj floroj. Estus tro longe pridetali la malsimplan procezon de la figociklo. Sume ni diru, ke la sovaĝa specio, fekunda, liveras grenojn, sed etproportciaj kaj nemanĝeblaj montriĝas la sovaĝaj figoj. La malsovaĝa arbospecimeno "funkcias" nur helpe de la sovaĝa. Ĝi estas malfekunda, sed post artefarita fekundigado ĝi donas bonkvalitajn figojn. Krome observeblas malofta fenomeno simila al partenogenezo.

Oni kalkulas la figarbajn speciojn po 800. La birdoj dissemadas la etajn sekfruktojn, la grajnoj. En somerkulmino la "silvio de la ĝardenoj" - alinome figobirdo- "laboras" kaj la arboj aliĝas al veraj flugejoj. Aŭtune la maturaj figoj dissplitiĝas: la birdoj ilin satmanĝas kaj pro tio, ke iliaj intestoj ne difektas la ĝermojn en la grenoj entenatajn, ili estas veraj kunlaborantoj en la figoprocezo.

En Antikveco la figo estis la dolĉa manĝaĵo, pli malmultekosta ol mielo. En la Malnova Testamento la figo aperas tutunue: Adamo kaj Eva kunkudris figfoliojn por fari al si zontukojn (verajn pikvundajn harĉemizojn...)

La figarbo simbolas la scion. Helena traduko de la Biblio (trian jarcenton a.K.) pluigita de la orientaj tradicioj eldiras, ke la malpermesita frukto estas la figo. Nu, estas konate, ke la kultivita figoarbo, male de la ceteraj arboj, ne kapablas spontane naski fruktojn. La "figarba hipotezo" ebligus forigi la kontraŭdiron inter la unua ĉapitro de la Libro de Genezo: "ĉiuj arboj, kies

fruktoj havas semojn estas proponitaj al la homo, kiel nutraĵo", kaj la dua ĉapitro, kie legeblas, ke nur unu arbo estas malpermesita -supozeble la figujo, "dezirinda por la scion akiri." Samas la simboliko en Oriento kaj Okcidento.

En Palestino la figarbo estas printempa indikilo. Male de la ceteraj arboj ĉi tiu kovriĝas per abunda foliaro komence de la printempo. Pro tio surprizas la frazo de Kristo: "Kiam la figarbo kovriĝas per ŝosoj oni scias, ke baldaŭ venos printempo." Por ni, Nord-Eŭropanoj, iom surprizas fakte la ĉi-supra frazo, ĉar en niaj regionoj la arboj kvazaŭ paŭzas en vintro, renaskiĝonte kiam printempas. Malsame okazas en la mediteranea baseno: ĉiam verdas la vegetaĵoj, krom kelkaj malmultaj specioj: migdalujo kaj...figarbo, kies folioj dumvintre falas.

En Francio la plej fama specimeno estis plantita en 1610 en Roscoff. Ĝi etendiĝis super 70-kvadrataj metroj. Ve! Oni estis devigata ĝin dehaki en 1986 post du teruraj vintroj. La bretona establo de la tiel-nomataj "orfoj de Auteuil" orfiĝis saviĉe je belega arbo.

Respektindas la figo, kiun Platono frandis kun aparta plezuro; kaj ankaŭ Ludoviko la XIV-a. Tial Jean-Baptiste de La Quintinie, lia ĉefa fruktoĝardenisto, klopodis regali la reĝan moŝton de la fino de junio ĝis la unuaj frosto. En Versajlo li kultivis la figarbojn en kestoj lokitaj sub ĉevalosterko de la monato januaro; poste apogitaj al muro suden rigardanta kaj ŝirmitaj sub vitrokadroj. Depost septembro oni ĝuis la fruktojn el ordinara arboj.

3- VITO - Ĉar antaŭ kelke da tempo la Kulturaj Kajeroj afable publikigis mian artikolon pri Dionizo, por ne tedi la legataron per ripetigantaj temoj mi limiĝos je la vitosimbolismo en la Biblio.

Tuj post la eliro el la arkeo Noa plantas viton, ebrigiĝas kaj aperas en sia plena nudeco. Jen la unua mispaŝo por la nova homaro! Pro tio la Korano malpermesas alkoholaĵojn al siaj fideluloj. La tuta vitosimbolismo priĝantas la amon. En la Malnova Testamento ĝi prezentas la elektitan popolon, kiun Dio amoplene plantis, gardis kaj prizorgis. Dio interparolas kun sia popolo, kiel vitoposedanto kun sia vitistoj.

En la Evangelioj pluraj paraboloj de Kristo baziĝas sur la vitotemo: la perfidaj vinberlaboristoj, kiuj mortigas la senditojn de la posedanto (t.e. la Profetoj kaj la Savonto); la laboristoj je la dek-unua horo dungitaj, al kiuj Dio libervole donas pli, ol kiom estas interkonsentita; la parabolo de la patro, kiu sendas siajn du filojn al la vinberejo. Kulminas la simbolismo en la Evangelio de sankta Johano: Kristo jam ne plu estas la posedanto, sed la vito mem, kies fideluloj estas la sarmentoj. El la vito ili ĉerpas la sukon kaj ne povus vivi senigitaj je ĝi. La vito simbolas la dian regnon, la korpon de Kristo, la tutan homokomunumon.

La islamaj mistikuloj dediĉis al la vino fajroplenajn poemojn: "Antaŭ ol, en ĉi mondo, estis ĝardeno, vito, uvo, nia animo ebrigiĝadis pro la senmorta vino." Kiel la plantosango, ĝi estas vivtrinkaĵo, garantiĝo de senmorteco. Tamen ĝi ebrigas kaj alkoholo estas mortoporta. Fari el vino simbolon de dieco, t.e. subiĝi je la dia transcendeco, kiu ŝajnas kontraŭdiri nia-mondajn veraĵojn.

4- GRANATARBO - Supozebla devenloko: la altebenaĵo inter Irano kaj Afganio. Tiu planto estas kvarfoje menciita en la Kantiko de l'Kantikoj. Ties frukton la Hebreoj surbrodis sur la ornamvestaĵoj de la ĉefpastro kaj ĝin prezentis sur la bronza kolonoj en la templo de Salomono. Tiu reĝo, granatfrandema, ordonis, ke la tutan surfacon de fruktoĝardeno oni priplantu per granatujoj.

En la flora lingvokodo la mesaĝo signifas ardan amon. La skarletkoloraj floroj plene taŭgas por ornamado. Sub tre malmola vesto la fruktointerno karakteriziĝas per parietoreto neregule dividanta loĝojn; ĉi tiuj entenas multenombrajn grajnoj unu ĉe la alia. Ili baniĝas en rozaspekta pulpo duon-sukerita, duon-acida. Pro la multnombro de siaj grajnoj la frukto estas emblemo de fekundeco. Tiun simbolismon oni trafas tra la tuta mondo (Grekio, Vietnamio, Afriko, Hindio...). Ankaŭ la kristana mistiko ĝin uzas: sankta Johano de la Kruco faras el ĝiaj grajnoj la simbolon de la diaj perfektaĵoj pro ties sennombraj efikoj.


5- DAKTILO - La daktilpalmarbo, 25-metrojn alta, vivas unu jarcenton, Linné ĝin titolis "la princo de la vegetaĵoj". Oni ofte ĝin renkontas en Nord-Afriko kaj Sud-okcidenta Azio. La frukto estas vivrimedo nemalhavebla por la dezertologantoj, ankaŭ por ties ĉevaloj kaj dromedaroj aŭ kameloj. La planto estus arabdevena. Ĝi havas ĉu virajn, ĉu inajn florojn. De ĉiam la homoj scipovis zorgi pri la polenigado. La palmo estis kultivata antaŭ sep mil jaroj, en la tempo, kiam Saharo ankoraŭ ne estis dezerto. En Helenio kaj ĉe la Romianoj daktilojn lokŝanĝaj vendistoj kutimis proponi al la teatrospektantoj.

La folioj estas simbolo de senmorteco; pro tio la Jerusalemanoĵ svingadis palmo-branĉojn antaŭ Jesuo dum la palmodimanĉo. Poste la palmo-branĉo signis la martirojn por soleni ties naskiĝon en la eterna vivo. Tial palm- aŭ oliv-branĉo en mediteranea Eŭropo, samkiel bukso en la norda, estas alfiksita al krucifikoj aŭ surtombe metita por simboli la kredon je senmorteco de l'animo kaj postmorta releviĝo.

Oni kalkulas proksimume 100 milionojn da daktilpalmoj tra la mondo; ĉiuj liveras inter 100 kaj 120 tunojn da fruktoj ĉiujare. Daktilo estas la plej nutropova frukto. Tial la Araboj ĝin konsumas kun lakto por havigi al si plenkontentigan manĝon.

S. BONIOL

(laŭ J.M. Pelt: "Des fruits")



PROPONO POR ELIMINI LA EŬROCENTRISMON DE ESPERANTO

ŜOVINISMA TRAJTO DE ESPERANTO -

En anglalingva artikolo pritraktanta proponitajn gvidliniojn por projektado de internacia helplingvo (1), la usona interlingvisto Rick Harrison specigas "objektivajn kriteriojn" por la kreado de tia lingvo. Unu el la sekcioj de lia eseo temas pri selektado de leksika materialo, kaj li ripetatas la oftan kritikon kontraŭ Esperanto: ĝi estas "ŝovinisma", ĉar ĝia vortrezoro estis ĉerpita plejparte el eŭropaj lingvoj. Laŭ Harrison, internacia lingvo devas posedi leksikon devenantan de la dominantaj lingvoj en la mondo, kaj li listigas jenajn dek du lingvojn: mandarena ĉina, angla, hispana, portugala, franca, germana, rusa, araba, bengala, hindia (kaj urdua), malajo-indonezia, japana. Manke de preciza statistika dokumentaĵo, Harrison arbitre skribas: "Ŝajnas, ke proksimume duono de la loĝantaro de la mondo estas parolantoj de tiuj lingvoj." Cetere li ne klarigas, kiel la vortmaterialo de tiom da lingvoj estu traktita por konsistigi koheran internacian helplingvon. Ekzistas tri ebloj: 1- ĉiu lingvo kontribuas la samajn procentojn (proks. 8,3%); 2- la procentoj estas kalkulitaj proporcie laŭ la nombro de parolantoj; 3- pli altaj procentoj de leksikaj elementoj venas de tiuj lingvoj, kiuj estas vaste parolataj ekster la limoj de la propra ŝtato.

Interlingvistoj kaj esperantologoj ja scias, ke la propono de Harrison ne estas nova. Ekzemple, en 1982, la franca esperantisto Pierre Janton prezentis la argumenton per jenaj vortoj:

"...la vortrezoro devus konsisti el vortoj selektitaj el la plej eble granda nombro da lingvoj; ĉiu lingvo devus kontribui sian parteton al la vortrezoro kaj mi aŭdis japanojn kaj arabojn bedaŭri, ke Esperanto estas ne sufiĉe japana aŭ araba kaj tro eŭrop-devena. Tiu riproĉo indas atenton.⁽²⁾ Janton ĵonglas per kelkaj ciferoj kaj konkludas, ke en lingvoj kiel la angla, franca kaj germana, la statistike gravaj

vortoj kaj esprimoj nombras nur 2000. Se oni dividas tiun sumon per la 12 lingvoj listigitaj de Harrison, tio signifas, ke ĉiu lingvo kontribuas nur 167 vortojn. Nek Harrison nek Janton provis prezenti tekston en tiuspeca statistike "neŭtrala" lingvo, do iliaj legantoj malfacile povas imagi, kiel ĝi aspektas.

EKSPERIMENTOJ KREI "NE-ŜOVINISMAJN" FORMOJN DE ESPERANTO -

Antaŭ kelkaj jaroj mi entreprenis eksperimenton ĉerpi leksikajn elementojn el preskaŭ la samaj lingvoj menciitaj de Harrison, kaj uzis tiun vortprovizon por traduki la unuan strofon de "La Espero". La ĉi suba listo indikas proksimume kiom da vortoj de la dek lingvoj devas esti en teksto por proporcie reprezenti la nombron de homoj parolantaj la koncernajn lingvojn.

Lingvo	%	Vortoj
ĉina	35	9
angla	15	4
rusa	10	3
hindia	10	3
hispana	10	2
indonezia	4	1
araba	4	1
portugala	4	1
bengala	4	1
japana	4	1

Por simpligo, la hindia kaj bengala estas kunmetitaj, same kiel la hispana kaj portugala (po 14% kaj 4 kaj 3 vortoj respektive). Jen la tradukota teksto:

La Espero

En la mondon venis nova sento,
Tra la mondo iras forta voko;
Per flugiloj de facila vento
Nun de loko flugu ĝi al loko.
En la traduko mi lasis netuŝitaj la Esper-
antan sintakson kaj vort-formadajn afiksojn.

La Ŝiŭango

In la dunijon datangis sjina ĉuvstvo,
Ĉerez ha dunijo dzoas prabala prizivo;
Tung feiloj from karua fengo
Alan from difango feiu it taraf difango.

La eksperimento ankoraŭ ne finiĝis, ĉar oni povas plivastigi la lingvo-terenon de la vere internacia lingvo, aldonante pli da diversaj lingvoj. Tio, laŭ la opinio de certaj

nebulaj pensantaj homoj, havos la efikon altiri la entuziasman subtenon de tiuj popoloj, kies lingvo estas reprezentita de nur manpleno da vortoj. Jen kiel aspektas la traduko de "La Espero" surbaze de la antaŭaj 10 lingvoj kaj ankaŭ jenaj 10 elektitaj specife por ebligi kontribuojn de ne-hindeŭropaj kaj ektereŭropaj lingvoj: amhara, cigana, haŭsa, hebrea, hungara, persa, suahila, taja, tagaloga, turka.

Ha Umido

In ha dunijon datangis бага erzeŝo,
Ĉerez ha dunijo raftanas gobuza rieko;
Tung kurukiloj dag karua barvalo
Alan dag lugaro kuruku it taraf lugaro.

Propono sen espero de sukcesoj

La konkludo estas klara, kiel kristalo: la misvojo, kiun volas sekvi Harrison, estas sakostrato sen elirejo. La rezulto de lia metodo elimini la eŭro-centran aspekton de Esperanto ne estas rimedo por faciligi homan interkomunikadon sed tutsimple kabineta kimero, bizara lingvo, kiu estas nekomprenebla por la plej multo da homoj en la mondo. Ĝi estas destinita fiaski same kiel ĉiuj ĝisnunaj naivaj planlingvaj projektoj, kiuj akompanis siajn aŭtorojn en la tombon.

NOTOJ:

1. Rick HARRISON: Proposed guidelines for the design of an international auxiliary language (4th draft). Journal of Planned Languages, N-ro 19, vintro 1994, pĝ. 8.21.

2. Pierre JANTON. Espero por Esperanto. Sennacieca Revuo. N-ro 110, 1982, pĝ.1.6 (citaĵo sur pĝo 2).

Bernard GOLDEN



Antaŭ 100 jaroj naskiĝis

LA EJFEL-TURO

Memore al la Franca Revolucio, estis decidite organizi Universalan Ekspozicion en Parizo en 1889. La organizantoj deziris montri "ion neordinaran" tiukaze. Ili decidis, ke estos konstruita sensimila arkitekturaĵo.. Jam en 1878, okaze de la tiama Universala Ekspozicio estis konstruita la palaco Trocadero (nomo de hispana urbeto, kie la Francoj tute senglore ilustrigis en 1823). Tiu palaco estis malkonstruita en 1936 kaj anstataŭigita per la nuna palaco Chaillot.

En 1885 okaze de la Tago de Sendependiĝo, la Usonanoj starigis en Vaŝingtono la faman obeliskon 170-metrojn altan. La francaj organizantoj de la Ekspozicio de 1889 deziris konstrui "ion pli altan". Pro la Industria Revolucio lanĉita helpe de la fervojo oni pensis pri metala turo. (La Angloj jam pensis pri tia turo en 1833 kaj la Usonanoj en 1874). La mason-entreprenistoj kontraŭis, pruvante eĉ, ke ne eblas konstrui turon el metalo. Sed la metala konstruaĵo estis elektita. Ĝi ne estu tro kosta, ĉar la tuta elspezo devos esti kompensita per la pago de la vizitantoj. Ĝi ankaŭ estos malkonstruita fine de la Ekspozicio.

Gustave Eiffel, aŭdaca ponto-konstruisto, prezentis planon, kiu estis akceptita la 26-an de majo 1886. Lia ĉefa ideo estis, ke la metala turo ne estu konstruita por la Ekspozicio, sed ke la Ekspozicio estu konstruita ĉirkaŭ la turo. Prezsentante sian projekton Eiffel diris: " Turo el masonaĵo estos tre malfacile realigebla; ĝi eĉ estos danĝera. La konstru-prezo estos tro granda kompare kun la celo. Estas tre malfacile pli bone labori ol la konstruintoj de la antikvaj tempoj, de la Mez-epoko kaj de la Renesanco..".

Cent sep projektoj estis studitaj el kiu unu proponis konstruaĵon rajdantan la riveron Sejno. Tiu pli alta de Eiffel estis elektita..

La alteco (1000 futojn) de la konstruota turo ne estis arbitra; ĝi limigis la bazon je kvadrato 100-metrojn flanka. La turo estos piramida sed kun hiperbol-arkaj eĝoj

por pli efike rezisti al la vento. Oni kompreneble konstruos interajn etaĝojn por firmigi la tuton kaj ebligis la konstruon de restoracioj kaj butikoj; estos eble akcepti 10 000 vizitantojn samtempe.

La kontrakto diris, ke Eiffel "ricevos subvencio de 1 500 000 frankoj..kaj la rajton ekspluati la restoraciojn, kafejojn kaj butikojn kondiĉe ke la vizit-prezo estu pli malalta dimanĉe kaj festotage..Tiu rajto daŭros dum 20 jaroj ek de la 1-a de januaro 1890 kaj estos poste transdonata al la urbo Parizo (de 1910 tiun rajton havas privata societo).

Kompreneble ne ĉiuj aprobis tiun konstruadon. Peticio subskribita de 300 personoj el kiuj tre konataj artistoj, arkitektoj, verkistoj...estis sendita al ĉiuj parizaj gazetoj:

" Sinjoroj, karaj samurbanoj,
Ni subskribantoj fortege protestas, nome de la preteratentita franca gusto, nome de arto kaj franca historio, kontraŭ la starigo centre de nia ĉefurbo Parizo de la senutila monstra Eiffel Turo.... Ĉu la urbo plu asociigos kun la barokaj profitavidaj fantaziaĵoj de maŝinkonstruisto por sin malbeligi kaj malhonoriĝi. Ĉar la Eiffel Turo, kiun eĉ la monŝatanta Usono ne volus posedi estas, sen iu ajn dubo, la malhonoro de Parizo....- Ĉu vi ŝatus, ke alilandaj vizitantoj diru:"Kio do? Ĉu la Francoj trovis nur tiun malbeleĝaĵon por pruvi sian faman bonguston?"

La kanzonistoj, la humuristoj profitis de tiu ridinda kverelo. Unu el ili eĉ skribis, ke la poetoj ne ŝatis la projekton pro tio, ke ili ne sukcesis trovi riĉan rimon por "Ejfel". La tiama ministro pri Komerco kaj Industrio respondis:"...tiel bela kaj nobla prozo, subskribita de homoj konataj en la tuta mondo, tre certe allogos multajn vizitantojn". Eiffel mem skribis:"...Mi asertas ke la Turo estos aparte bela. Ĉu, ĉar ni estas inĝenieroj , ni ne atentus belecon?... Mi asertas, ke la kurboj de la kvar eĝoj, tiaj kiaj ili estis donitaj de la kalkuloj, kiuj de nekutime granda bazo suprenĵetiĝas pintiĝante ĝis la supro, certe impresos per siaj forto kaj beleco... Ĉu nur pro sia estetika valoro la egiptaj piramidoj tiel forte impresas la homan imagon ?"

Rimarkindas en tiu laboraĵo de Eiffel, kiu uzis vertikale la arton de metal-trabaro, kiun li jam apogeigis horizontale, la perfekteco de la plano kaj la strikteco de la konstruado.

(daŭrigota)

BOHEMA TAGO

L.N. NEWELL

(Fino)

Subite li vekiĝis; oni parolas al li - kio estas? Tiam li rimarkis, ke la virino sidanta ĉe la tableto argumentas kun la kelnero pri la pago, kaj en rapida franca lingvo petas la subtenon de la studento. "Pardonu, fraŭlino, mi ne aŭdis...vi kompreneblas...mi ne tre alktimiĝis al via lingvo; mi estas alilandano..." Rigardinte lin serioze, trankvile, ŝi sin turnis al la kelnero kaj daŭrigis la argumentadon. La studento provis reiri al Trojo:

Estis momento ĉi kiam unua dormeto komence
Donon dankindan de dioj en homojn enigas mizerajn.
Jen al mi, antaŭ okuloj, subite Hektoro aperas
Sonĝe, fortege malĝoja, kaj larmojn verŝanta multegajn;
Tiel li estis do, kiam duopaj lin trenis ĉevaloj,
Sanga je polvo kovrita, per liaj piedoj ŝvelintaj,
Kiujn rimeno traboris...

Ne eblas; la ĉarmo forflugis. Li ek-rigardis la fraŭlinon kaj trafis ŝin rigardanta lin. Li rimarkis rapide, ke ŝi portas felan palton, estas juna, pala, kun ombroj sub la okuloj, diskrete ŝminkita, kaj havas brunajn harojn. "Tiuj kelneroj!" ŝi diris; "ili ĉiam tro postulas. Vi parolas france?" - "Jes, meze bone, kaj komprenas bone se mi atentus" - "Nu, vi tre baldaŭ mastros ĝin. Vi estas studento?" - "Jes, fraŭlino." - "Mi bone konas la studentojn. Mi estis amikino de studento alilanda, ĝis antaŭ ses monatoj. Sed li finis siajn studojn, kaj reiris al sia hejmo." Li sentis al ŝi grandan dankemon: unua dum la tago ŝi parolas al li homece. Liaj okuloj karesis ŝin ridete. "Do, vi eble nun estas iomete sola?" - "Jes, antaŭe mi ĉiam estis kun li; nun mi estas sola. Li devis reiri; sed li ne tre bone traktis min. Li proponis doni al mi dek mil frankojn, sed mi volis dudek mil; oni devas vivi. Li

rifuzis, sed de tempo al tempo li sendas al mi iom da mono." - "Kio estas via profesio?" La studento ruĝiĝis; li sentis subite, ke eble tiu demando estas maltakta. Sed ŝi respondis tute trankvile: "Mi estas kudristino - sed mi ne laboras nun. Oni ĉiam devas labori sub virino, kaj tion mi ne povas toleri. Vi komprenas? La virinoj amas piki unu la alian, kaj kiam estas tro multaj en profesio, oni ne povas argumenti. Ne, tion mi ne ŝatas." - "Do, ĉu vi...ĉu vi permesas demandon?...Kiel vi sukcesas subteni la vivon?" Ŝi ete tiris la ŝultrojn kaj grimacetiĝis ĉarme. "Nu, mia studento kelkfoje sendas monon. Mia ĉambro kostas nur cent dudek frankojn monate. Mi vivas. Sed la iometo da kapitalo, kiun mi havis, eluziĝas; necesas io. Do mi kelkfoje konatiĝas kun sinjoro, sabaton aŭ dimanĉon - nur sabaton aŭ dimanĉon, vi komprenas - kaj eĉ ne ĉiusemajne. Aliaj faras same, kaj mi estas tre zorgema kaj tre diskreta. Mi neniu ĝenas; kaj ĉiudumonate mi vizitas la kuraciston. Ĉiam la ekzameno estas negativa". Ŝi rigardis lin demande, ne trude. Denove li sentis sin absurde, freneze dankema al ŝi: iom da intimo, iom da homa kontakto, propono de amikeco - komerca eble, sed... sed, nu, tamen ŝi proponas doni sin, kaj neniu povas fari tion sen varmo ĉe la koro. Li subite deziregis kunecon kun ŝi, kunparolon, kunmarŝon: ne plu la sola vivado, estus iu kun kiu komenti la pasantan horon, la legaĵon, la homojn.

Kia ironio: li eĉ ne havas sufiĉe da mono por bone manĝi! Se ŝi scius, kiom malriĉa li estas, ĉu ŝi ankoraŭ ridetus tiel amike? Li esploris ŝiajn trajtojn, la klarajn grizajn okulojn, la buŝon iomete tro larĝan, la iel bonkoran esprimon, kaj li kredis, ke jes. Li konsilis korpon ĉe sia flanko kaj suprenrigardante, vidis studentinon iomete konatan. "Halo! Estas vi?" - "Jes, jen mi; ĉu ĉio glatas?" La virino ĉe la tablo levigis kviete kaj estis maltrudeme forironta. La studento haltigis ŝin per gesto kaj proponis la manon. Ŝi premetis ĝin. "Ĝis revido, fraŭlino; eble ni denove renkontiĝos tie ĉi." - "Eble; ĝis revido." Ŝi ridetis provante nei sian ekziston per persista nerigardado al la studentino. La studento turnis la okulojn al la bruanta homamaso sub la ŝvebanta fumo; parolis kelkajn frazojn banalajn kaj eliris sur la bulvardon. Estis mallume. La kafejoj plejparte jam fermiĝis. La bulvardo estis preskaŭ senhoma. La

vento glacie penetris eĉ la plej dikan palton.

Kun tremeto kaj malluma penso pri la varmo kaj kuneco forlasitaj, li sin turnis maldekstren, al la placo Sorbonne. Ĉe la angulo estis malhela, senforma amaso, kaŭranta flanke de rubujo. Preterpasante li rimarkis, ke estas maljunulino, malpurega kun glujaj haroj falantaj kaj strioj de maljuneco kaj malpureco sur la vizaĝo. Ŝiaj vestoj estis nuraj ĉifonoj. Ŝi tenis en la manoj difektitan statueton de S-ta Johano d'Arc, el gipso; ŝi, kun larmaj okuloj, rigardadis ĝin, kaj ŝajne ne konsciis la mondon ĉirkaŭ si. Li kaptis la vortojn: "Bela Johano, mia kompatinda Johano; vi kompatinda..." - kaj ŝi kisis la statueton.

Lia brusto premiĝis; estis io malmola el lia gorĝo. Do, eĉ tia estaĵo, tia kompatindaĵo, povas kompati, trovi ion dorlot-eblan; tiu kiu mem bezonas senfinan kompaton? Li palpserĉis en la poŝo, kaj trovis tri frankojn; li reiris kelkajn paŝojn kaj donis al ŝi la monon, zorgante ne tuŝi ŝian malpuregan manon. Ŝi nenion diris, sed rigardis lin per nevidemaj okuloj.

Pli malpeze li pluiris, marŝante rapide al la domo. Kiom da mizeruloj estas! Sen hejmo, sen fajro, sen manĝo, sen kunulo. Sed ĉu vere sen kunulo? Tiu ĉifonaĵo ja havas sian S-tan Johanon, duone diino, duone pupo, sed kunulo. Kaj la kompatito en ŝia voĉo!

Li grimpis la ŝtupojn de la domo triope: tia ekzerco iom varmigas. Lia ĉambro ŝajnis eĉ pli malvarma ol la strato. Li rapide senvestigis sin kaj enlitiĝis. Memorbildoj de la virino en la fela peltito kaj la maljunulino en la ĉifonoj dancis en lia cerbo; kontraŭ sia kutimo, li ne povis legi. Li blovestingis la kandelon kaj kuŝis rigardanta la mallumon.



LA BLANKA KOLOMBO

Raymond Schwartz

Ĉu estis sonĝo aŭ memtrompo?
Mi kuŝis meze de narcisoj
Kaj interŝanĝis kun kolombo
Naivajn pensojn kontraŭ kisoj.

Kontakte kun la pluma frato
Mi povis jam min improvizi
Kantisto pura de l'beato,
Francisko II-a de Asizi.

Beata, kiu migras blinda
Sur la damnita mondinsulo,
Duoble ŝajnas viv' vivinda
Al simplanima narcisulo!

Ho bela estas al okulo
De l' blanka birdo nia tero;
En ĉiu part' de molekulo
Miraklo pulsas aŭ mistero.

Kaj kulturante la mistikon
Pri la tutmonda harmonio
Mi himne kantis amkantikon
Kaj vidis pekon en nenio:

Ĉu ĵaluzulo? - Li modestas.
Ĉu avarul' - Ŝparema tipo.
Kaj kolerulo simple estas
En Dia mano forta vipo.

Knabinoj de sekretaj stratoj,
Vi portas la Venusan mirton;
Samariane al homfratoj
Vi podetale cedas virtont!

Kaj dum persiste mi konstatis
Nur bildoflankon de l' medalo
La homoj moke min kompatis:
"Jen l' idioto de l' kvartalo!"

.....
Mi ne plu flugos birdodigne
Tra nerealaj paradizoj,
Ĉar la kolombon mi rezigne
Konsumis kun printempaj pizoj...

LA LIBERIĜO DE LA JUĜISTO

F. Szilágyi

(Fino)

La parolado daŭris same senpere kaj nature, kiel ĝi komenciĝis. Ŝi estis fianĉino kaj nun vojaĝas hejmen al la ĉefurbo. Tie ŝin atendos li. Ili babilis sed sub iliaj vortoj pagana faŭno komencis peli la nimfon de la brunflavaj arbustoj kaj la radiantaj vivoĝojoj ĵetis fajron ankaŭ en la koron de la cetera sinkaŝema knabino. Oni nur devis alrigardi ŝin: ĉio, ĉio anoncis korpan kaj animan purecon, senperan, konscian, saĝan purecon. Oni devas konfesi al tiu junulino...Kaj post duonhoro, li jam konfesis. Nu ne pri amo li konfesis, sed nur pri la hodiaŭa mateno. Ne, pri la edzino li ne parolis. Ne pro virfriponeco, sed li mem ne sciis al si klarigi, kial tiu parto ellasiĝis el la konfeso. Kaj ankaŭ sian nomon li ne diris; sed tion li ne faris koncie; nur poste konstatis, ke tiam ili ne volis scii la nomojn. Dum la konfeso liaj okuloj brilis, lia vizaĝo ardis kaj la tuta entuziasmigita knabvizaĝo, lia ridemo kaj plezuro faris dum minutoj tiun vojon, kiu estas ofte pli longa ol la plej longa distanco sur la tero kaj atingis la koron de la knabino, senkondiĉe transdonis sin al la papilia gaĝejo. Kaj preskaŭ senhezite ŝi konsentis ke ŝi ne daŭrigos nun la vojaĝon, ke ili kune promenos sur la forlasitaj promenadejoj de la apudlaga banko. Ŝia fianĉo ja ne scias tute precizan alventempon; ŝi povas alveni post kelkaj horoj. Kaj oni ne devas timi tiun ĉi grandan knabon. La tuta epizodo promesas plezuron, forgesigan, feliĉan epizodon. Ne, ne inde batali kontraŭ tiu ĉi neniam revenonta sento. Kaj ili, nur ili solaj, forlasis la vagonaron ĉe la apudlaga stacio.

La granda stacio oscedis pro la malpleno. Kelkaj miraj rigardoj ĝenis ilin, sed baldaŭ ili forapidis kaj staris sur la bordo de la violkolora, belega lago. La alia bordo apenaŭ vidiĝis kaj sur la tuta granda akvo nur sola velŝipo naĝis en la malproksimo. Iom pli proksime kan-arbaro

luliĝis kaj sovaĝaj anseroj, kriantaj birdoj flugis al la ĉielo. La ondoj mallaŭte tintadis kaj lavis la delikatan sablon de la bordo. Trankvilo, trankvilo, trankvilo! Nun juna akva serpento spiralis antaŭ ili. La knabino ektimis kaj la viro subtile, kun frata sento, ekkaresis ŝin... Iom melankolia estis ĉio, la malgaĝeco sentiĝis en la trankvilo; io subsentis la alvenon de io nekonata. La viro satoriĝis per melankolio. Poste ili promenis kaj parolis preskaŭ neniom. Sed tiu silento ne postulis klarigojn; tiu silento estis la plej perfekta esprimilo de iliaj komunaj pensoj... Ili jam havis emon por ludi. Tamen ili ne sentis sin trompitaĵ, sed plenplenaĵ de la plej inspira kontentiĝo...La viro rigardis ŝin. La graciaj piedoj singardeme tuŝetadis la sablon, kvazaŭ ŝi timus, ke pro la pli reala surpaŝo rompiĝos la sorĉo; ŝia ĉarma kolo iom fleksiĝis kaj la okuloj, tiuj brunaj profundaj okuloj, brulis en melankolia fajro. Ĝis nun ili ne rigardis unu la alian kaj poste, tute memkompreneble, en la sama momento, sen hezito kaj ĝeno, kaj sentante ian mirindan fratecon, ili simple interkisiĝis.

Ĉe la rando de la horizonto aperis nubostrio kaj la palaj konturoj de la kontraŭbordaj mondoj malaperis. Post kvaronhoro la vento ekblovigis kaj la subite ekiĝinta pluvo ekkurigis ilin. Tiam ili ridegis. La sorĉa vualo disiriĝis en la pluvo kaj en la pluvego ili devis rapide serĉi azilon...Sur la bordo, forlasite, izole dormis kelke da vilaoj. La pluvo plifortiĝis, kiam ili atingis la unuan. Neniu en la ĉirkaŭaĵo. Senpense, nur iom petole, ili elprenis siajn ŝlosilojn; kaj ne estis la unua miraklo hodiaŭ, la dua ŝlosilo malŝosis la pordon de la vilao. Ĉio, kvazaŭ en sonĝo. La knabino reridis kaj ili eniris.

La vilao ne estis tute neloĝita. Almenaŭ ŝajnis, ke oni kutime vizitas ĝin ĉiusemaine. Iom da malordo, ia ĝejmece, atestis, ke oni estis en ĝi antaŭ kelkaj tagoj kaj la malfermita libro sur la tablo iom ektimigis ilin, ke la posedanto de la vilao revenos; sed tuj poste la viro, kun infaneca ĝojo, malkaŝis la rezulton de sia detektiva esplorado: en la tuta domo estis nur dimanĉaj kaj sabataj gazetoj; do la posedanto de la vilao estis tiaspeca obstina semajnfino. Pri tio ili absolute ne pensis, ke ili faris ion kontraŭkutiman, speciale ne pensis pri tio ankaŭ la juĝisto.

Rideme kaj ridege ili eniĝis en la

interesan situacion kaj jam ne estis mirinde ke post la subite aperanta malsatiĝo ili ambaŭ fervore serĉadis manĝaĵojn. Kaj post ne longa tempo ili trovis skatolon da sardenoj kaj tiun trezoron ili kompletigis per la buterpanpecoj, kiujn la edzino de la juĝisto enpakis. "Ĉu via edz...?", demandis la knabino kun iom milda riproĉo.

Tio estis la unua vorto, kiu rilatis lian normalan vivon kaj la ombreto, kiu dum momento eksidis sur ilia humoro, baldaŭ forflugis. La pluvo malrapidiĝis kaj ili daŭrigis la detektivadon; ili rigardis la libron lasitan sur la tablo. "Inteligentulo," eldiris la knabino la verdikton, "rigardu, li legas la plej modernajn francajn verkistojn." - "Li estas fraŭlo," konstatis la juĝisto, kiu rimarkadis speciale la ne tute modelan mikson de la aĵoj. Kaj ili decidis, ke ili lasos kelke da dankvortoj al la posedanto. Kiel li surpriziĝos!

Dum la esplorado kaj malkovro de la nekonata vivo, li ekflamiĝis kaj subite kun kontraŭstarebla vervo li premis al si la knabinon. Ŝi fermis la okulojn, ekstremis kaj baraktis inter la fortaj brakoj kaj falis, falegis. Nur momenton daŭris tiu ĉi malstreĉiĝo; en la sekva minuto ŝi koncentrigis sian tutan forton kaj ekkriis: "Kion vi faras? Rigardu!"

Tra la fenestro ili ekvidis, ke la gardisto de la bankolonio proksimiĝas. Terure! Kio okazos, se li trovos ilin ĉi tie? Piedfingre ili ŝtelkuris al la malhela antaŭĉambro kaj kun batega koro ili aŭskultis la smaĉon de la proksimiĝantaj kaj poste foriĝantaj pezaj botoj. Ili reekspiris. La viro provis ridi kaj la respondiĝo de la knabino estis tre malgaja. Tiam revekiĝis en li la rabviro. Li volis fini la komencitan batalon. Sed la knabino milde protestis. "Ne forgesu la gardiston", ŝi diris kun subtila simbola ironio.

Kaj li ne forgesis la Gardiston. La Gardisto, la moralo jam reaperis en tiu ĉi senverŝajna sonĝo. Lia dorso ekfrostis, kiam li pensis pri la skandalo, kiu estus povinta okazi. Pensu, li estas juĝisto! Kaj la unua sento estis profunda malkontenteco kaj malesperiĝo kontraŭ la ligiteco, kontraŭ la maljusteco de la papilie efemera vivo, kiun oni devas aranĝi kvazaŭ oni vivus eterne.

La knabino rigardis la horloĝon: "Sankta ĉielo! Ni devas rapidi por ke ni atingu la vagonaron." - "Jes, ni devas rapidi", respondis la viro kaj eksvingis la malplenan

botelon, kiun li tenis en la mano. "Kion vi faras?" demandis ektime la knabino. "Mi nur rompas la murspegulon", respondis la viro dum la spegulsplitoj tintbrue falis sur la plankon. Kaj li aldonis: "Ion oni devas fari"

Ili kuris. La vagonaro de la knabino jam staris ĉe la stacio. En la lasta momento ŝi alvenis. Dum la kurado ili jam ne pensis pri la pasintaj horoj, nur pri la feliĉa saviĝo. Ili ne pensis pri tio, ke eble estus bone malfrui; ili nur kuris, kuris... Kaj kiam la knabino jam estis en la kupeo kaj kun iom pala reviviĝo de la sonĝo ŝi ridetis al la viro, li postulis de ŝi: "La nomon, la adreson..." - "Neniam, neniam", respondis la knabino kaj la vagonaro forportis ŝin en la nebulon de la sonĝoj.

Kaj nun ankaŭ li sidas en vagonaro. Ne estos pli ol la sesa vespere, kiam li realvenos. Ŝt-ŝt-ŝt-ŝt... la radoj muzikas; nun li estas survoje al la hejmo.

NI RIDU

"Nu! via filineto fulmotondras per la fingroj", diras la piano profesoro al patrino. "Ĉu vi parolas pri ŝia rapideco?", demandas la patrino flatita. "Ne", respondas la profesoro, "mi diras tion ĉar ŝi neniam frapas dufoje la saman lokon".

Varme gratulita pro triopa nasko, juna patrino klarigas, ke, laŭ la kuracisto, tia nasko okazas nur unu fojon el naŭ mil. "Sed", diras amikino, "kiam vi trovis tempon purigi vian domon?"

Dum komuna manĝo ĉiuj ĉeestantaj entreprenestroj plendis pri la ekonomia situacio. Nur unu el ili montriĝis optimisma. "Nu, kial ne diri la kialon?" li diris al sia apudsidanto. "Mia klientaro kreskas ĉiutage". - "Mi ŝatus koni vian profesion", diras la najbaro, miranta. "Mi vendas vestojn kaj ŝuojn por infanoj."

Multaj personoj plendas pri la stulteco de siaj estroj. Nur ĉar ili ne konscias, ke inteligentaj estroj maldungus ilin.

SOLVO DE LA ANTAŬA ENIGMO

La trovotaj vortoj estis: LAKTO, KRIMO,

POR VIA DISTRO

KRURO, MARDO, BRAKO, LIBRO, TRIKI,
STELO, MELKI, GRIZA, MARTO, FRAKO,
VOSTO, KRONO, PETRO, KRETO, LINKO,
KRUTA, CEDRO, BLEKI, MARKO, SVENI,
HAVRO, TREFO, HUNDO, FLAVA, PASKO.

La mezaj literoj de tiuj vortoj formas
la jenan proverbon:

KIU RABIE ELIRAS OFTE RABIE REVENAS

LITERA ENIGMO

La solvo konsistas el 90 literoj, kiuj estas numeritaj. La literoj estas troveblaj per la
sekvantaj ŝlosilvortoj:

8 7 1 9 11 36 5 24 18 22 : balkana lando

6 29 15 25 12 31 54 39 : tabaka veneno

14 13 3 15 41 73 20 55 59 : ŝtona ĉerko

26 27 65 37 35 16 61 : nomo de monato

84 2 76 48 23 10 68 80 : nomo de tago

17 48 32 56 86 44 38 45 82 : alpa floro

15 42 33 66 19 6 47 11 15 9 : granda festo

58 53 21 67 54 78 79 22 : orientazia lando

4 52 68 49 50 64 74 75 76 72 25 : eŭropa maro

43 51 40 90 88 89 : denove diri aŭ fari

14 77 2 60 30 62 39 : reĝa bastono

63 83 69 24 71 36 10 1 85 41 : favorrajto

46 57 56 87 81 59 : bulba floro

70 17 3 32 34 5 28 61 : malsupra domparto

1.....90 : interesa aserto de la franca scienculo J.B.L. d'Alembert (1717-1783) pri
kelkaj landoj de Eŭropo.

LA VIVO EN GRESILLON

RAKONTO

" Alo! " Ĉu s-ro B. ? Ĉi tie Matilda S. Mi ŝatus renkonti vin. " - " Saluton, sinjorino. Konsentite. Tuj post via alveno en Gresillon, se tio plaĉas al vi. " - " Ne. Mi ne iras al Gresillon ĉijare. " - " Do, kion fari? Vi scias, ke mi ne povas iri al via urbo nun. Pro la deĵoro nuntempe mi ne povas foresti unu tutan tagon. " - " Ne tiom longe vi forestos. Mi devas iri al R. tra Tours. Mi devas ŝanĝi la trajnon tie; mi disponos dek liberajn minutojn. Tio sufiĉos. " - " Sed, kion vi intencas fari? " - " Vi vidus surloke. Do ĝis postmorgaŭ, sur la kajo en la stacidomo en Tours. Konsentite? Ĝis! ". Klik! Finite.

Kion tio signifas? Kion Matilda intencas fari, duonmistere? Ŝi estas bone konata ĉar ŝi plurfoje ĉeestis studperiodojn en Gresillon. Maljuna ŝi estas kaj maljuneca estas ŝia vestostilo. Ŝi devenas de familio kun longatradicio burĝa sed verŝajne ne plu riĉa; ĉu la vestojn de Matilda ne jam surhavis la patrino? La ĵupo kaŝas preskaŭ la tuton de la maleoloj super alte laĉitaj ŝuoj. Streĉe kombita hararo enkadrigas senrida vizaĝo. La tuto estas kronita de ŝajne centjara nigra ĉapelo.

Dum du tagoj s-ro B. faris al si demandojn, telefonis al s-ro Micard por peti lian opinion. Ĉu tiel gravas la afero, ke ĝi ne povas atendi? Kial ĝi ne povas esti pritraktita perletere aŭ pertelefono? Ĉu vere gravas afero, kiu postulas diskutadon nur dekminutan? Sur kajo de stacidomo? Detektivfilmoj ofte montras homojn, kiuj renkontiĝas en mult-homaj lokoj por ne tiri la atenton. Ĉu Matilda bezonas anonimecon? Ĉu la afero estas tiel sekreta? La respondoj al tiuj demandoj venos nur post du tagoj, sur kajo de stacidomo, inter du vagonaroj!

" Mi scios, pri kio temas post duonhoro, " diris al si s-ro B. sidiganta ĉe la stirilo de sia aŭtomobilo. Sed dum la tuta vojaĝo kunsidis granda demandosigno. S-ro B. fruas kvaronhoron. " Kie haltas la vagonaro venanta de B. ? ". La fervojisto montras la duan kajojn. Nova demando: ĉu la renkontiĝo devas okazi sur la kajo de la alvenanta vagonaro aŭ sur tiu de la forironta? ... Por pli certe "kapti" ŝin prefere estas akcepti ŝin ĉe la alventrajno. Nur pacienciĝu !

Bruo alproksimiĝas, laŭtiĝas. Bremsoj knaradas. "Tours! Tours! ,La vojaĝantoj al R. ŝanĝas la vagonaron". Malfermiĝas la vagonpordoj. Gejunuloj elsaltas. Pli malpli rapide elvagoniĝas la vojaĝintoj, foje kun pezaj valizoj. Fine eliĝas la nigre vestita silueto atendata. Ĉemane ŝi tenas unufanke mezpezan valizon, aliaflanke sakon el nigra tolo. "Saluton, sinjorino. " - " Ah, saluton. Ni tuj iru al la alia kajo. " S-ro B. malŝarĝas ŝin de ŝia valizo kaj sekvas ŝin klopodante akordigi sian paŝadon kun ŝia. Survoje ŝi parolas sed almenaŭ la duono de la vortoj miksiĝas kun la ĉirkaŭaj bruoj. Jen la taŭga kajo, la taŭga vagonaro. Ili haltas, kaj finfine s-ro B. ricevas la respondojn tiel longe atenditajn. " Mi havis gravan problemon pri la heredaĵo de mia patro: malkonsento kun la edzino de mia mortinta frato. Sekve...proceso! Kiun mi gajnis pro tio, ke mi komprenis la teknikajn leĝajn vortojn, kaj tion precize, dank'al mia scio de esperanto; la latindevenaj vortoj multe helpis. Mi estis preta ĉesigi la batalon, kiam mi malkovris esperanton. Mi do multon ŝuldas al esperanto kaj al Gresillon kaj mi deziras danki esperanton tra Gresillon. Do, mi donacas tion."

Sed nenio elvenis el la nigra sako. Ne! Tie, sur la kajo, antaŭ dekoj da personoj, Matilda levis sian ĵupon kaj demetis de sia zono grizan tolsaketon, el kiu ŝi elprenis pakajon envolvitan en gazetpapero kaj ligita per ŝnuro. Ĉar jam alvenis ŝia vagonaro ŝi rapide diris: " Malvolvu ĝin en Gresillon. Ĝis! "...En la kastelo amiko diris: " Kio estas tio? Malnovaj paperoj? " For la ŝnuro! For la papero! En la pakajo denove paperfolioj sed ne ordinaraĵ: akcioj de grava franca entrepreno. Kvar milionoj da frankoj, malnovaj ĉar tio okazis antaŭ tridek jaroj. La Esperanto-Domo estis riĉa...

..Provizore ĉar kelkajn jarojn poste la sumo devis reveni al la heredantoj. Sed tio estas alia afero...!

LIBRO-SERVO

Jen kelkaj sugestoj por viaj jarfinaj donacoj:

- 1) al infanoj: Kapti ŝteliston (14 f.) - Pesi elefanton (14 f.)
Asterikso kaj la Normanoj (60 f.)
- 2) al plenkreskuloj: Bagatelaro (45 f.) - Brava soldato Ŝvejk (35 f.)
La verda koro (35 f.) - Mistero minora (65 f.)
Nobela novelaro (37 f.) - Marianne (37 f.)

Ne forgesu ankaŭ la poŝtkartan kalendaron 1997 (1,50 f.)

Mendu de S-ino J. VINCENT, 26bis, rue de Milngavie FR-49150 BAUGE

NE sendu monon; atendu la fakturon.

NIAJ PERKORESPONDAJ KURSOJ

POR LA KOMENCANTOJ: Kurso per mem-korekta metodo. Tiu metodo ebligas progresadon adaptitan al la ritmo elektita de la lernanto, kiu, paŝon post paŝo, korektas mem siajn erarojn. Testo-folioj sendotaj al la korektanto ebligas kontrolojn. La korektanto tiam atentigas la lernanton pri la lingvaj punktoj ankoraŭ ne bone asimilitaj.

La prezo de tiu kurso estas: 200 fr. fr.

POR LA PRAKTIKANTOJ: por akiri la praktikadon de la lingvo. Ilustrita kurso, tekstoj, gramatikaj rimarkoj, taskoj sendotaj al korektanto.

La prezo de tiu kurso estas: 200 fr.fr.

SUPERA KURSO: De- kaj al-tradukoj, atentigoj pri gravaj gramatikaj punktoj, ĉefaj eroj de la historio de Esperanto. Bona preparado al la Atesto pri Kapableco.

Prezo de la kurso: 150 fr.fr.



Mi pagis mian abonon
ĝusta tempe.
Kaj vi?

al P. Babin, poŝtkonto Nantes 281361L
aŭ al via peranto: vidu liston sur la
lasta kovrilpaĝo

GRAMATIKO PER BONHUMORO




VERBIGADO DE LA VORTOJ

i - iĝi - um - izi - verbigas ciajn vortojn

- I) **Kun substantivaj radikoj** (kongresi, fulmi) (ruinigi, pacigi) (tagiĝi, viciĝi) (foliumi, mastrumi) (najlizi, pasteurizi).
- II) **Kun adjektivaj radikoj** (verdi, fieri) (sekigi, pravigi) (identiĝi, nigriĝi).
- III) **Kun adverbaj radikoj kaj aliaj elementoj** (adiaŭi, apudi, cirkaŭi) (nei, jesi, bisi) (nepriĝi, anstataŭigi, troigi) (indigi, enigi, eksigi) (nepriĝi, disiĝi) (ebligi, arigi (unuigi, triopiĝi) (dekumi, kvaronumi).


(Ligiloj al la radikoj)

Televido ne avaras



- Papago ! neniu tiel aĉajn vortojn diras !
- De-kiam vi gastigas min, mi tranoktas antaŭ la televido ; fortsonaj vortoj hipnotizas min !

Ke fulmorapide ili trafu !



- Sinjoro mi petas. Mi ŝatus aĉeti tablojdojn ; plej malmolajn.
- Plej malmolajn ?
- Jes - Ĉu vi ne vendas ŝtalizitajn tablojdojn ?

Forflugintaj revoj



... Kaj la bona feino jesis al tri el liaj deziroj : bonjaraj vinoj, belvizaĝaj virinoj kaj plej grave senimpostigo.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (250 aŭstr. ŝil.).

Belgio : Librovendejo Kariljono, vzw Doornstraat 22. 2610 Wilrijk Akceptas kreditkartojn - prezo : 600 BEF.

Britujo : John C. Rapley, 17 The Grange, Shepherdswell, Dover, Kent CT 15 7 Q B. (10 pundo)

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (90 krono)

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (70 mk.).

Germanujo : Annelis Rudolf, DACHSBERGSTRASSE, 1 W 3507 BAUNATAL pĉk. Frai (M. 2759 35-609) (25 D.M.).

Hispanio : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10*-D 03003 ALICANTE - (1 700 pe

Italio : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura (20.000 liroj).

Japanio : S-ro Tara Niŝiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôziŝi TO

Jugoslavio : Jelena Andjelkovic, Nova 61/1, YU-11213 Beograd

Nederlando : Gerard van der Horst, Hengelolaan 1158, 2544 GT DEN HAAG poŝtkonto : 39743. (28 fl.).

Nov-Zelando : Sino Gwenda Sutton, 12 c Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1 (aerpoŝte : 18 n.z.dol).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, ul. Krucza 38/42 00512 VARSOVIO (15 us. dol.).

Portugalo : Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. João Couto, 6, R/C-A - 1500 Lisboa (2.800 esk.).

Svedujo : Sveda Esperanto-Asocio, Södra Rörum, pl. 455, S-242 94 Hörby - p.k. : 2012-3 (80 kr.).

Svislando : Esperanto Perkoresponde, Claude Gacond, strato Chevreuils 14, CH-2300, La Chaux-de-Fonds, PK.23-4669-1 (22 s.f.)

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (15 us. dol. - aerpoŝte : 20 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 15 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj. Aerpoŝte : 20 us. dol.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anonciĝajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfera frateca ;
Por ekterni aŭ plulerni ia internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la esperantista kulturdomo

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkuponeto al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, F-49150 BAUGÉ. — Tél. 41-89-10-34